

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2008

Vendredon la 28an de marto

56a jaro

Kalendaro

(Kie? kiam? – vd. la lastan paĝon)

Mardon la 1an de aprilo (semajno / uke 14) – *tirsdag*

La domkomisiono planas grandajn ŝanĝojn en la kunvenĉambro prepare al luigo. Vd .p. 3. Kion ni opinias?

Huskomiteen har planer om store endringer i møterommet for å kunne leie det ut. Se s. 3. Hva mener vi?

Lundon la 21an de aprilo (semajno / uke 17) – *mandag*

Bjørn K Øyen: Vegetarismo – kulturaj / religiaj, ekologiaj kaj (spirit)sciencaj aspektoj. Kun gustumaĵoj.

Bjørn K Øyen: vegetarisme – kulturell/ religiøse, økologiske og (ånd)s)viten-skapelige aspekter; med smaksprøver

Mardon la 6an de majo (semajno 19) – *tirsdag*

Leif Arne Storset ĵus pasigis tri monatojn en Barato / Hindio. Ni demandas lin pri liaj impresoj kaj travivaĵoj.

Leif Arne Storset er nettopp tilbake fra et tremåneders opphold i India. Vi spør ham ut om hvordan han opplevde det.

Lundon la 19an de majo (semajno 21) – *mandag*

Leif Arne Storset iris jarfine al Germanio por la Internacia Seminario kaj komitatkunsido de la internacia junulara organizo TEJO. Ni demandas lin kiel sukcesis tiuj aranĝoj.

Leif Arne Storset reiste til Tyskland ved årsskiftet og deltok på det internasjonale seminaret og på et internasjonalt komitémøte. Vi spør ham hvordan det gikk.

Mardon la 3an de junio (semajno 23) – *tirsdag*

Cato Haugen partoprenis 9-semajnan kurson pri uzado de komputilaj programoj kaj lernis multajn novajn ruzaĵojn. Kaj Nicolas Raymond klarigos pri Vikipedio, la nova interreta enciklopedio, kiun ĉiuj verkas mem .

Cato Haugen har deltatt i et 9-ukers kurs i bruk av dataprogrammer og har lært mye nytt og nyttig. Og Nicolas Raymond forklarer om Vikipedio, internettleksikonet som vi skriver selv.

Lundon la 16an de junio (semajno 25) – *mandag*

Vd. p.2 →

Postpaŭze, ĉiukunvene: Lingvaj demandoj. (Kunportu la viajn!)

Språkspørsmål etter pausen på hvert møte. Ta med dine!

Lundon la 16an de junio (semajno 25) – *mandag*

"Mia ŝipo ŝarĝiĝis per pli bona Esperanto". Lingvaj kaj aliajn ludojn gvidos Heming W. Thorbjørnsen.

"Mitt skip er lastet med bedre Esperanto." *Språk- og andre leker med Heming W. Thorbjørnsen.*

Okazis

Lundon la 18an de januaro.

Per kromebrano en la kunvenĉambro muntita de Cato ni spektis filmetojn pri la brazila E-movado, kiujn havigis Asbjørn el la reto: pri la Agotago en São Vicente (apud São Paulo) kaj pri E-informado dum la Monda Socia Forumo en Porto Alegre. Tie oni vigle diskutis, kaj disdonis milojn da faldfolioj informante en la nomo de la organizo "Libereco por la lingvoj" sed parolante en Esperanto por vekti la scivolemon de la publiko. Poste ni interparolis pri aranĝoj en Oslo kie ni povos starigi nian informbudon kaj fine petis la prijuĝon de Otto pri kelkaj lingvaj defioj.

Mardon la 4an de februaro

David Welsh forlasis budhisman kunvenon en sia loĝejo (Budhisma centro) por veni klarigi al ni la esencon de budhismo kaj praktike partoprenigi nin en mallonga meditado. Multajn demandojn havis la klubanoj – pri la celo, la fonto, la praktikado, pri reenkarriĝo, pri budhismo en Tibeto kaj pri Zen en Japanio, pri budhismaj medioj en la Okcidento, en Norvegio – kaj en la najbara Disen. Ĉeestis pli multaj membroj ol kutime, kaj ni rekonstatis ke tiaj vivkonceptaj temoj stimulas al viglaj klubaj kunvenoj.

Lundon la 17an de februaro

Algis donis fundan kaj detalan prezenton de sia mondkoncepto, pri sep tavoloj aŭ sferoj, kiuj ĉirkaŭvolbas la homon; de la tera, akva, aera kaj fajra ĝis la anima kaj spirita. Celo de la vivo estas el ili unu post la alia liberiĝi. Ankaŭ la etikaj konfliktoj de la ĉiutaga vivo trovas sian interpreton kadre de tiu metafizika modelo de la homa evoluo, kiun li mem evoluigis inspirite i.a. de pensmanieroj de teozofio.

Informbudo en Skedsmo

Okaze de *Husebydagene* 5 – 8. junio eblas havi informbudon pri Esperanto. Tie kutime ĉeestas pli ol mil personoj kaj estas tre varia programo. Informoj pri Esperanto kaj nia klubo aperos en broŝuro 6000-ekzemplere.

KPH

Ŝanĝoj en Esperantonia

Pro draste kreskintaj domelspezoj (i.a. pro la malfondo de la Eldonejo), nia klubo kaj NEL suferos nun ĉiujare grandan deficiton kaj bezonas novan enspezofonton. Tial ni decidis provi luigi la kunvenĉambron, ekz-e 1-2 vesperojn semajne, al aliaj organizoj. Luontojn ni devos serĉi, kaj tio pli bone sukcesos se ni unue renovigos la ĉambron. La landa kunveno en Trondheim lastsomere donis – kontraŭ unu voĉo – plenrajton al la domkomisiono decidi pri la ekipaĵo en Esperantonia (vd. *N.E-isto* 5/2007. p. 5). Nun la domkomisiono diskutas planojn

- konstrui vandon antaŭ la kuirejeto – ĝis la kolono
- forigi la bibliotekajn librojn el la kunvenĉambro
- liberigi spacon en la kelo por tiuj kaj aliaj bibliotekaj libroj, per forigo de la stoko de novaj libroj de la (nun malfondita) Eldonejo – sed kien?
- forigo de mebloj kaj aĉeto de novaj

Kion ni opinias pri ĉi ĉio? Ni diskutos la proponojn en la unua membrokunveno, la venontan mardon, la 1an de aprilo (semajno 14).

La domkomisiono ankaŭ bezonas praktikan helpon. Ili instigas ĉiujn interesatojn partopreni en la renoviga laboro. Ili aranĝos **du labor-semajnfinojn / dugnader** iam antaŭ merkredo la 7a de majo. Bv. mesaĝi se vi volas kaj povos veni helpi.

DD

PÅ NORSK

*For å rette opp vår skrantende økonomi skal vi prøve å leie ut møterommet 1-2 kvelder i uken. Men før det organiserer huskomiteen en rengjøring og opprydding. Bl.a. er det foreslått å sette opp en lettvegg foran minikjøkkenet, å anskaffe nye møbler, og å flytte bibliotekbøkene ned i kjelleren. Det siste forutsetter at vi frigjør plass der ved å lagre det tidligere Forlagets bøker et annet sted. **Er det noen som** kan tilby tørr lagringsplass f.eks. hjemme, til noen esker med bøker?*

Vi tar en diskusjon om disse planene på det første klubbmøtet, tirsdag 1. april.

*Det blir et par **dugnader** i tiden fram til 7. mai, for å*

Rydde plass i kjelleren

Vaske salongen

Pusse opp lokalet

Forbedre klubblokalet slik at det er bedre tilpasset utleieformål

Si fra hvis du vil være med.

Huskomiteen ved Cato Haugen

Kiel kompreni la jarkalkulon?

La jarkalkulo ŝajne montras profiton de 8365 kr. SED tiu tuta sumo (kaj iom pli) devenas de la supozita valoro (12 412 kr) de la heredita parto de la domo kiun ni heredis de la Eldonejo – dum ĝin iom reduktis la asigno de 3500 kr el la fondaĵo Gustavsen . Se ni tenas tiujn du nenormalajn spezojn ekster la kalkulo, ni vidas ke ni reale havis **mal**profiton de 548 kr. Tio donas pli ĝustan impreson de la kluba ekonomio, kvankam ni atentu ke tiu sumo estas rezulto de la sola utila elspezo – investo de 1309 kronoj por 500 glumarkoj (el kiuj ni vendis ĝis nun nur ĉ 100). Do la kluba ekonomio estas pli-malpli en ekvilibro? – Bedaŭrinde ne. Ni pagis al la domkonto (kiel internan domluon) 7 000 kr, sed jam antaŭ pli ol du jaroj la Liga kasisto konstatis ke necesas pagi almenaŭ 9 000 kr jare por kovri ĉiujn elspezojn (inkl. hejtadon kaj asekuron). Kaj aldone al tio, la Eldonejo, kiu antaŭe portis trionon de la domelspezoj, malfondiĝis en junio 2007, tiel ke nia klubo devas transpreni duonon de ĝia kontribuo. Sekve nia interna domluo reale devus esti almenaŭ 13 500 kr – 6 500 pli ol ni pagis lastjare. Do ĝis ni iel sukcesos produkti novajn **ens**pezojn, ekz-e per luigo de la kunvenoĉambro kelkvespere, ni devos ĉiujare preni tian sumon el la kapitalo.

Cetere ni ŝuldas al NEL ĉ 30 000 kronojn pro la tubara laboro en 2006. (Tio ne estas indikita en la jarkalkulo.) Sed konsole tio estas unufoja elspezo.

DD

Nia **biblioteka ekspozicieto** staros en aprilo en la filio de Furuset.

Glumarkoj La klubo vendas ruĝajn glumarkojn 4 x 7 cm, kun la teksto

ESPERANTO – det internasjonale språket –
nøytralt fredsfremmende lettlært kontaktskapende
www.esperanto.no 22 35 08 94 inform[a]esperanto.no.

Taŭgas por valizoj, tekoj, man-sakoj k.s. Po 2 kr.

Kunvenejo: Olaf Schous vei 18 (enirejo Schouterrassen), 0572 Oslo.

Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj iru supren laŭ Båhusveien – aŭ malsupren de Sinsen T (buso) / Sinsenterrassen (tramo).

Tlf. 22 35 08 94 www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: oficejo[a]esperanto.no
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL 0533 05 22870).

Ĉi tiun *Bultenon* prizorgis Douglas Draper